

# LITERATURA INFORMILO

ELDONATA DE LA

## ESPERANTO-FAKO

ĈE LA ELDONEJO

FERDINAND HIRT & SOHN EN LEIPZIG

No. 5



Somero 1928

## METODOJ EN LA INSTRUADO DE ESPERANTO

ANDREO ĈE

La redaktanto de tiu ĉi Informilo faris al mi grandan honoron petante artikolon pri la metodoj en la instruado de Esperanto. Kun plezuro mi uzas la okazon por konigi kelkajn spertojn, ne tuŝante tion, kion fakaj eminentuloj jam kunskribis pri tiu temo.

Antaŭ ĉio mi devas informi la neinformitan leganton pri tio, ke mi tute ne estas instruisto aŭ scienculo, kaj mi tute ne posedas „instrumetodon“, kiel oni komencas nomi la manieron, en kiu mi igadas homajn grupojn paroli Esperante. Ne estante fakulo mi ja eĉ ne havas la rajton fari metodon. Sed la historio de la afero klarigas ĉion:

En 1920 en la transilvania urbo Sibiu (Hermannstadt, Nagyszeben) la laboristaro invitis min instrui Esperanton. Kompreneble mi diris: jes kaj mi tuj komencis fari la preparojn: mi serĉis bonajn lernolibrojn en la librojoj. Sed ne troviĝis eĉ unu ekzemplero. Mendi oni ne povis, ĉar estis postrevolucia tempo, la limoj fermitaj, la poŝto sub severa cenzuro: komplete blokado. Do mi ne povis fari kurson. Kaj tio estis la feliĉo. Mi simple decidis fari nur konversacion Esperante. Kaj ni komencis. Min helpis nigra tabulo kaj kreto, la lernantojn papero kaj krajono. Sed ni ĉiuj havis grandan entuziasmon kaj sopiron por baldaŭ povi interkompreniĝi en Esperanto, ĉar ni apartenis al pluraj nacioj diversaj.

Komence ni parolis pri aferoj plej proksimaj kaj uzante nur la plej simplajn gramatikajn elementojn. Poste ni progresis iom post iom al temoj pli malproksimaj kaj al gramatikaĵoj pli malfacilaj. Post 20 lecionoj ni jam povis interparoli Esperante.

La bona rezulto kuraĝigis nin organizi similajn „kursojn“ tra tuta Rumanujo. Kvankam alvenis jam lernolibroj, eĉ famaj kursaj lernolibroj, ni devis resti fidelaj al la maniero de la unua kurso, ĉar ĝi montriĝis tre taŭga por instrui nian lingvon.

Fariĝis do „metodo“ naskita de vera bezono kaj entuziasmo, elprovita kaj sukcese aplikata en diversaj landoj.

Ĝi estas rekta metodo, iganta tuj paroli la lingvon kaj kvazaŭ sorĉanta ĉirkaŭ la lernanton la Esperanto-landon. Tamen la gramatika instruo ne estas ekzilita, ĉar ĉe Esperanto tio ne necesas. La gramatiko de Esperanto estas ja tiom simpla kaj facile komprenebla, ke ne estas kaŭzo ĝin time eviti. Kontraŭe: la instruado de Esperanto ŝajne devas pasi sur la reloj de la gramatiko. Tion postulas la speciala karaktero de nia lingvo kaj la fakto, ke nia gramatiko estas tiom okulfrapa kaj krianta, ke eĉ kaŝate ĝi instruas sin mem. La metodo estas do kunigo de la rekta kaj gramatika metodoj, konforme al la specialaj ecoj de Esperanto.

Estas eraro en la instruado de Esperanto sekvi metodojn faritajn por aliaj lingvoj. Nia lingvo tiome diferencas de la aliaj, ke ĝia instruado nepre postulas apartan propran metodon. Mi deziras atentigi speciale pri la admirinda sistemo de la korelativaj vortoj, kiel grava helpo en la instruado.

Cetere la boneco de la metodo dependas ĉefe de la persono de la instruanto: de lia kompreno, emo, temperamento, psikologia kono. Tial anstataŭ ĝeneralaj deklaroj mi preferas nur informi pri spertoj.

La kurso konsistas el 20 lecionoj, kiuj enhavas la tutan gramatikon kaj ĉirkaŭ 600 vortradikojn. Ĉiu leciono estas nura konversacio por multe ekzerci, praktiki la dume iom post iom aperantajn gramatikajn formojn. En la unuaj lecionoj estas tre malmulte da vortoj, por ne ŝarĝi per ili la memoron je la konto de la gramatiko. La celo estas atingi parolan pretecon kaj facilecon. Tiun celon servas precipe la ĥora respondado. En la kursoj ofte partoprenas tre modestaj, malkuraĝaj personoj, kiuj ne ŝatas respondi, paroli. Sed en la granda bruo de la ĥora respondo ankaŭ tiuj kuraĝiĝas kaj riskas respondi. Jen rimedo por malfermi tro ŝlositajn buŝojn.

Ĉiu leciono entenas nur malgrandan porcion da gramatiko, por ne konfuzi la memoron kaj por povi ĝin facile digesti.

Troviĝas instruantoj de Esperanto, kiuj aplikas la metodon instrui la tutan gramatikon jam en la unua leciono kaj poste per legaĵoj kaj konversacio vastigi la vortotrezoron. Mi opinias, ke tiu metodo tro alte taksas la povojn de la homa cerbo. Tion pruvas la sperto, ke el tiuj kursanoj preskaŭ neniu sukcesas kaj la plejmulto eĉ forlasas la kurson jam post kelkaj lecionoj, naŭzita de la tro grasa manĝo.

Pro la sama motivo mi severe malpermesas uzi lernolibrojn. Kelkfoje mi observis, ke entuziasmigita lernanto tuj en la nokto post la unua leciono trastudis la tutan gramatikon kaj per tio li sukcesis krei en sia kapo tian ĥaoston, ke li neniam povis ellerni la lingvon. Li agis kiel la malsaĝa malsanulo, englutanta la tutan medikamenton anstataŭ preni nur kuleron. La saĝa lernanto kuras malrapide kaj havas paciencon. Tial, se mi rimarkas ĉe lernanto libron, mi ne hezitas ĝin ĝentile, sed firme konfiski ĝis la kursofino.

Alia malutilo de la leŝnolibro estas, ke ĝi kutimigas la lernanton al malordo. Bela vetero, societo aŭ interesa filmo facile forlogas lin de la leciono, ĉar li ja povas relerni la lecionon hejme el sia libro. Dum la leciono la sama preteksto tentas lin al distriĝo. Sed ne havante libron, li estas devigita regule viziti la kurson kaj streĉi la atenton.

La konstanta ĉeesto de la atento estas gravega faktoro. Havigi ĝin estas la tasko de la instruanto. Tial la lecionoj devas esti kiel eble plej interesaj, amuzaj, la tuta kurso devas okazi inter la plej agrablaj cirkonstancoj.

La sola lingvo uzata en la kursoj estas kompreneble Esperanto kaj tio estas grava faktoro de la sukceso. Precipe se la instruanto estas alinacia, kion mi juĝas esence grava cirkonstanco pro diversaj kaŭzoj. Tiam la lernantoj devas streĉi la atenton, la instruanto devas bone labori anstataŭ komforte helpi sin per alia lingvo.

La klarigado dum la kurso okazas nur en Esperanto, per la jam lernitaj vortoj. Tio havigas ne nur bonegan gimnastikon al la cerbo, sed ankaŭ ofte tre amuzajn momentojn. Multe da spritaj kaj amuzaj difinoj mi lernis de la kursanoj kaj jam kreigis speco de kursa Kabe-vortaro. Jen kelkaj specimenoj el ĝi:

SUNO: la varma lampo natura. PLUVAS: la ĉielo ploras. PLORAS: akvo venas el la okuloj. OKULOJ: pordoj, tra kiuj la bildoj eniras. FRUKTO: la plej bona parto de la arbo. STOMAKO: la plej grava parto de la homo. DANCI: elegante levi la piedojn. SKRIBAS: metas vortojn sur la paperon. LEGAS: la okuloj promenas sur la vortoj. SUPO: dika akvo kolora. ETIKETO: la plej grava regulo de la vivo, kiu diras: diru nur belajn frazojn, ne verajn frazojn. VENDEJO: loko, kien oni eniras kun mono kaj eliras sen mono. LAŬDI: diri, ke la objekto estas pli bona, ol ĝi vere estas. GASTO: sinjoro, kiu venas al la familio kaj havas grandan apetiton. KONGRESO: multaj homoj en granda ĉambro sidas, parolas kaj ne komprenas. Se ili komprenas, ĝi estas Esperanta kongreso.

Foje mi demandis kursanon, ĉu li komprenas la vorton „fianĉo“? Li respondis: Fianĉo estas unu feliĉa sinjoro, kiu havas ringon. Poste mi demandis alian, pli aĝan kursanon: Kion signifas „edzo“? Per tre natura voĉo li respondis: Unu malfeliĉa sinjoro, kiu havas ringon. Kaj la tuta kursanaro bonege komprenis la signifon de tiuj vortoj.

Kursojn laŭ tiu metodo kun granda sukceso gvidadas nuntempe sinjoroj Tiberio Morariu en Rumanujo, S. Prager en Antverpeno kaj sinjoro Ernfrid Malmgren en Stockholmo.

Mi bone scias, ke tiuj kursoj havas kritikantojn, ne laste inter eldonistoj kaj libristoj. Sed ili ne pravas. Ĉar ankaŭ miaj kursanoj bezonas bonajn gramatikon kaj vortarojn post la kurso kaj fariĝante bonaj Esperantistoj ili restas daŭraj klientoj. Krom tio miaj kursoj estas nur elementaj. La dua kurso estas la legado de bona literaturo, kion mi ĉiam plej varme rekomendas kiel nepre necesan rimedon al la perfektigo.

Kun aparta plezuro mi faras tian rekomendon sur la paĝoj de tiu ĉi Literatura Informilo, kiu entenas la liston de verkoj unuarangaj en lingvo, valoregaj laŭ enhavo, plej elegantaj laŭ aspekto.

# ESPERANTO — INTERNACIA LINGVO DE TEKNIKO KAJ SCIENCO

IR. J. R. G. ISBRÜCKER

Inter teknikaj kaj lingvaj problemoj laŭŝajne estas granda distanco, kiu eble estas kaŭzo, ke multaj teknikistoj ne tro ŝatas okupi sin pri lingvaj aferoj. Tamen aliflanke la teknikaj vortaroj pravas, ke ankaŭ por la teknikisto la lingva demando povas havi sian gravecon, tuj kiam li volas igi sin komprenata ekster la rondo de siaj samlandanoj aŭ pli ĝuste dirite, de siaj samlingvanoj. Tiurilate estas ia signifo en la fakto, ke jam la plej malnova inĝeniera laboro, kiun la homa historio mencias, la konstruo de la Turo de Babel, mizere malsukcesis pro la lingvodiferenco. Aŭ ĉu tiu turokonstruado nur devas esti komprenata kiel simbolo de kion ni ankoraŭ ĉiutage vidas, nome, ke malbona kompreno estas la kaŭzo, pro kiu de la konstruaĵo de la homa feliĉo eĉ la fundamentoj ne ankoraŭ estas pretaj?

Ĉiuokaze, la benita lando, al kiu aludas la vortoj de Genezo 11: „Sur la tuta tero estis unu lingvo kaj unu parolmaniero“, eble ankoraŭ ŝvebas kiel idealo antaŭ la okuloj de iu teoriulo, estos nur malmultaj, kiuj ankoraŭ kredos je ĝia efektivigo. Neniu lingvo, kiel gepatra lingvo uzata sur la tuta tero, povus daŭre ekzistadi ne ŝanĝite kaj ne disfalte en dialektoj. La evoluo de la scienco kaj de la tekniko instruis al ni, ke estas malsaĝe sin miksi en la leĝoj de la naturo mem, sed ankaŭ, ke ĉiu, kiu respektas tiujn leĝojn, povas eĉ ebligi kio ŝajnis nebla.

La argumentoj, kiuj pledas por la akcepto de Esperanto kiel internacia lingvo de la tekniko kaj de la scienco, kompreneble estas grandparte la samaj kiel tiuj, kiuj valoras por la enkonduko kiel internacia lingvo ĝenerale. En tiu ĉi momento interesos nin la demando, ĉu tekniko kaj scienco bezonas internacian lingvon kaj ĉu Esperanto jam estas preta plenumi tiun rolon.

Sendube la tekniko kiel aplika fako de la scienco ekhavas ĉiam pli internacian karakteron; tio volas diri, ke la evoluo de la tekniko nepre ne povas limigi sin al la nacieco, ĉar ĝi bezonas materiajn kaj spiritajn fontojn el la eksterlando. Ju pli intense la tekniko ekspluatos la riĉaĵojn de la naturo, des pli evidentiĝos, ke ĉie helpo el la eksterlando estas bezonata kaj pro tio la uzo de unu aŭ pli da fremdaj lingvoj altrudas sin al la teknikisto kiel necesa helpilo. Ĉiu teknikisto kaj same ĉiu sciencisto, kiu volas resti informata pri la progresoj de sia fako, estas devigata studi ne nur la propran literaturon, sed ankaŭ la eksterlandan kaj tio signifas, ke la kono de fremdaj lingvoj fariĝas neevitebla.

Estas vere, ke en multaj landoj la franca, la angla kaj la germana lingvoj estas instruataj kiel la ĉefaj lingvoj de la okcidenteŭropa kulturo, kaj tial estas multaj homoj, kiuj povas almenaŭ legi tekstojn en tiuj tri lingvoj aŭ ĉiuokaze en unu el ili, precipe kiam koncernas la propran fakliteraturon. Sed kio estas publikigata en itala, hispana, holanda, sveda, dana, rusa, ĉeĥa, hungara kaj en multaj aliaj lingvoj eŭropaj kaj ekstereŭropaj, tio restas por la plimulto kaŝita trezoro, kies ekziston ili eĉ ne konjektas. Oni certe ri-

markas ian emon uzi prefere iun el tiuj tri ĉefaj lingvoj por tre gravaj publikigaĵoj kaj tiu koncentriĝo al tri lingvoj havas multe da avantaĝoj, sed tiuj lastaj estus ankoraŭ multe pli grandaj, se oni povus koncentrigi al unu sola lingvo. Mi ne bezonas insisti pri la dezirindeco, eĉ neceseco de la fakto, ke tia koncentriga aŭ internacia lingvo estu nepre neŭtrala por ke ĝi havu ian ŝancon al ĝenerala adoptado kaj la rolo, kiun Esperanto do devos ludi en tio estas tute klara.

Mi estos la lasta, kiu neos la grandan utilon, kiun havas la studo de fremdaj lingvoj, precipe por tiuj personoj, kiuj okupas sin pri tekniko aŭ scienco kaj do ofte ludos ian gvidantan rolon en la homa societo. Sed tiu ĉi afero tamen havas du flankojn: estas vere, ke la studo de fremdaj lingvoj estas tre utila por la ĝenerala edukado, sed la celo de tiu studado tamen troviĝas grandparte en la atendo, ke ĝi donos al la lerninto ian kvanton da praktika kono, kiu dum lia posta vivo estos por li tuj utiligebla. Tamen la lingvostudado tiurilate ofte ne donas kion ĝi devus doni. Oni povas esti certa, ke, se la lernanto dediĉus unu dekonon de la peno, kiun kostas al li la studo de la tri nomitaj lingvoj, al Esperanto, li kun multe pli da lerteco povus manipuli tiun ĉi lingvon ol iun fremdan naturan lingvon. Oni povus do liberigi naŭdek procentojn de sia al la lingvostudo dediĉita energio kaj povus utiligi ĝin por la evoluo de la ĝenerala edukado, ĉiu laŭ sia gusto aŭ laŭ siaj talentoj. Kelkaj certe okupus sin plue pri la lernado de fremdaj lingvoj kaj aliaj pri aliaj fakoj, sed ĉiuj havus taŭgan kaj ĉiam pretan helpilon por la internaciaj rilatoj.

Se scienco kaj tekniko bezonas ĝeneralan, internacian lingvon, oni devos postuli de tia lingvo, ke ĝi precize kaj klare esprimu ĉiujn ideojn. Ne ekzistas iu natura lingvo, kiu tiurilate povas konkuri kun Esperanto, ĉar la signifo de ĉiu vorto en Esperanto estas kvazaŭ matematike difinita de ĝiaj vortelementoj. En naturaj lingvoj kontraŭe la signifo de la vortoj ofte dependas de kutimo kaj arbitreco. En Esperanto la signifo de vorto kunmetita el la elementoj a, b, c ktp. estas kvazaŭ trovata per la adicio de la signifoj de la elementoj:  $a + b + c + \dots$ . Tiu regulo estas ankoraŭ pli precizigita de la konataj „principoj de neceseco kaj sufiĉeco“, akceptitaj de la Akademio.

Por ĉiu, kiu ŝatas precize difini, Esperanto estas „dorado“ kaj sendube la lingvo povos ludi gravan rolon por fiksi la internacian nomenklaturon de ĉiaj fakoj. Kiel oni scias la naciaj fakesprimoj estas ofte tiaj, ke la signifo de similaj vortoj ne tute koincidas en diversaj lingvoj. Esperanto do povas esti uzata kiel bazo por precize fiksi la signifon de ĉiu vorto kaj ĝi estas tiel taŭga por tio, ĉar ĝi ebligas tiel akurate kaj precize difini. La internaciaj komisionoj, kiuj okupas sin pri la fiksado de la nomenklaturon en diversaj lingvoj, povus sperti multe da utilo per la uzado de Esperanto.

La demando de la nomenklaturon rekondukas nin al la sciencaj kaj teknikaj vortaroj. Kiel en ĉiu alia lingvo oni devas distingi en Esperanto la ĝeneralan vortaron de la tiel nomitaj fakaj vortaroj. Bazon por la ĝenerala vortaro formas en Esperanto la Universala Vortaro de D-ro Zamenhof kun ĝiaj oficialaj aldonoj, ellaboritaj de la Lingva Komitato, sed la efektivigon de la fakaj vortaroj D-ro Zamenhof prave lasis al la fakuloj. La kunmeto

de tiaj fakaj vortaroj kompreneble postulas grandegan laboron kaj ni tute ne ankoraŭ povas diri, ke ĝi jam estas farita. Tamen estas eraro opinii, ke pro tio la uzo de Esperanto por teknikaj kaj sciencaj celoj estus malobligata aŭ nur malhelpata. Oni ne forgesu, ke same kiel en aliaj lingvoj la teknikaj kaj fakaj vortaroj verdire ne estas uzataj por dikti la formojn de la fakaj terminoj, sed por ilin enregistri post kiam la uzo oficialigis ilin.

Cetere estas multaj teknikaj kaj sciencaj vortoj, kiuj per la ordinaraj sufiksoj povas esti derivataj el la radikoj de la Universala Vortaro. Laŭ tiu metodo naskiĝis vortoj kiel „frotangulo“ el froti kaj angulo, „dentrado“ el dento kaj rado, „akvotuba kaldrono“ el akvo, tubo kaj kaldrono. Tiaj vortoj estas tuj kompreneblaj kaj formeblaj por la personoj, kiuj konas la ideojn, kiujn ili reprezentas. Plue ni havas la gravan „regulon 15-an“ de la Fundamento, laŭ kiu internaciaj vortoj povas senpere esti transprenataj de Esperanto, se ili nur adoptas la formon, kiun postulas la Esperanta ortografio. Estas multaj vortoj, kiuj parte apartenas al la ĝenerala vortaro kaj parte al la fakaj kaj kiuj estas tuj rekoneblaj pro sia internacia formo, ekz. lokomotivo, telegrafo, telefono, cilindro, teorio, aŭtomobilo, aeroplano ktp.

Fine ekzistas por ĉiu fakoj serio da vortoj, kiuj ne estas formeblaj laŭ unu el la ĵdu menciitaj procedoj. Tamen en tiu okazo oni ĉiam havas la eblecon elekti vortojn laŭ la sama maniero, kiu validas por la ĝenerala vortaro: oni prenas vorton el unu aŭ el kelkaj de la naciaj lingvoj, zorgante, ke oni kiel eble plej bone respektas la internacian karakteron de la lingvo. Laŭ tiu metodo formiĝis vortoj kiel „lagro“, „munti“ ktp.

Estas facile kompreneble, ke malgraŭ ĉio la tasko de tiuj, kiuj volas uzi Esperanton por teknikaj kaj sciencaj celoj, estus multe plifaciligata per la ekzisto de bonaj fakaj vortaroj, ankaŭ pro tio, ke oni pli facile povus atingi unuecon en la nomenklaturaj. Tiurilate ni tamen devas jam respekti kion libervola laboro ĝis nun atingis. Ĝeneralaj enciklopediaj vortaroj, kiel tiuj de Verax kaj Wüster, jam ekzistas por atesti pri tio. Krom tio multaj pli aŭ malpli kompletaj terminaroj por diversaj fakoj jam estas eldonitaj, kiuj povas servi kiel gvidiloj por ĉiu, kiu volas verki en Esperanto pri specialaj temoj.

Ekzistas unu fakoj de la tekniko, kiu nuntempe vekas tre ĝeneralan intereson, kiu faris teknikistojn kaj sciencistojn el homoj de la plej diversaj metioj kaj profesioj: la radiotelefonio. Se estas nur unu branĉo de la tekniko, kiu bezonas internacian lingvon, tio certe estas la radiotekniko, de kiam ĝi atingas ĝis malproksime preter la limoj de la propra lando aŭ pli ĝuste dirite de la lingva teritorio. La sfero de la aŭdebleco de la sendstacioj ĉiam plivastiĝas kaj la aŭdantaro de la grandaj stacioj jam apartenas al multaj nacioj, precipe en Eŭropo. Ne estas mirige, ke la intereso por Esperanto en radiorondoj estas kreskanta. Tion pruvas la jam multaj kursoj en Esperanto dissenditaj el granda nombro da stacioj. Kelkaj radiogazetoj, kiel „Experimental Wireless“, aperigas regule Esperantajn resumojn pri siaj anglaj artikoloj, tiamaniere efektivigante la deziresprimon de la Konferenco de la Periodikoj, okazinta en Parizo en 1925. En la sama jaro kunvenis en Parizo ankoraŭ du konferencoj, kiuj okupis sin pri Esperanto kiel teknika kaj scienca lingvo. En la Paskaj tagoj okazis Unua konferenco de la Radio-amatoroj, kiu laŭ la ekzemplo de la „American Radio Relay League“

adoptis Esperanton kiel internacian lingvon de radiokomunikaĵoj kaj presigis siajn protokolojn en ĝi. La dua konferenco estis tiu, kiu kunvenis en Majo por speciale okupi sin pri Esperanto kiel Internacia Scienca Lingvo kaj al kiu gravaj societoj sendis siajn reprezentantojn. Sendube tiu konferenco tre helpis disvastigi la komprenon, ke Esperanto estas destinita fariĝi la internacia scienca lingvo de la estonteco, kiel la latina lingvo iam estis en la pasinta tempo. Tre verŝajne ĝi ankaŭ influis la rezolucion de la Internacia Telegrafa Unio, kunveninta en Septembro de la sama jaro en Parizo, kiu adoptis Esperanton kiel klaran lingvon en la telegrafa trafiko kaj donis al ĝi lokon apud ĝia kvazaŭkonkuranto, la latina lingvo.

Ni volonte nomas Esperanton la „Latinon de la Demokratio“; ĉu ĝi ne jam ankaŭ meritas esti nomata la „Moderna Latino, internacia scienca lingvo“?

## VOĈOJ DE POPOLOJ EN KANTOJ

El la antaŭparolo de l' samtitola kolekto de popolkantoj,  
tradukitaĵ germanen de J. G. Herder, aperintaj 1778—1779.

PAUL BENNEMANN

„La antikva greka poezio vivis en la orelo de l' popolo, sur la lipoj kaj la harpo de vivantaj kantistoj; ĝi kantis historion, okazaĵojn, misterojn kaj miraklojn; ĝi estis la floro de l' propreco de popolo, de ĝiaj lingvo kaj lando, aferoj kaj antaŭjuĝoj, pasioj kaj aroĝoj, muziko kaj animo. — Ho, ke mi estu sukcesinta, el tiuj plej noblaj popolkantoj de la pratempo traduki ion en nian lingvon, sed tiel, ke ili ankoraŭ restis almenaŭ iomgrade tiaj, kiaj ili estis. Homeros, Hesiodus, Orpheus! Mi vidas antaŭ mi viajn ombrojn tie inter la aro sur la insuloj de l' feliĉuloj; mi aŭdas la postsonojn de viaj kantoj. Sed mankas la ŝipo, kondukanta de via lando al mia kaj al mia lingvo. Sur la maro de l' reveturo la ondoj obtuzigas la harpon, kaj la vento returnblovas viajn kantojn tien, kie ĉe eternaj festoj kaj dancoj iliaj sonoj neniam perdiĝos.“

„Ĉar tiuj tradukoj (de anglaj popolkantoj) devis resti tiaj, kiaj ili estis en la originalo, mi ne povis doni al ili pli da korekteco; aŭ mi estus redoninta novajn, aliajn poeziaĵojn. Kie en la originalo estis pli da korekteco, mi ankaŭ provis esprimi ĝin; sed mi neniel hezitis, ĝin forĵeti, se ĝi aliigis la karakteron de la versaĵo.“

„Ankaŭ el la hispana lingvo mi elektis nur malmultajn pecojn; ĉar nenio estas pli malfacila ol la traduko de simpla hispana romano. Kiam longa historia poeziaĵo, en kiu ĉiu dua linio finiĝas per ‚ar‘ kaj tiel belege kaj agrable sonas en hispana lingvo — nu, traduku iu tiaĵon en nian lingvon!“

„La spirito de kanto estas nemortonta kaj efikas plu. Kanto devas esti aŭdata, ne legata, devas esti aŭdata per orelo de l' animo, kiu ne denombras kaj mezuras kaj pesas la silabojn, sed aŭskultas la melodion. Ankaŭ ĉe tradukado estas plej malfacile, transpreni tiun melodion el fremda lingvo.“

Herder, kiu la unua en Germanujo eldonis kolekton de kantoj el la tuta mondo, tradukitaĵ de li en germanan lingvon, havis tre delikatan oreleon, por aŭdi la proprajn vortmelodiojn de la plej diversaj kantoj, kaj respekt-


indan poetan kapablon; por resonigi ilin en la traduklingvo. Krome li ofte permesis al si, traduki la tekstojn sufiĉe libere. Kaj fine: Li donis la versojn por deklamado, ne por kantado; por la plej granda nombro de liaj kantoj verŝajne la muziknotoj ne estos troveblaj.

Kaj ni esperantistaj tradukantoj de tutmondaj popolkantoj, kiam ni penas plenumi la severajn postulojn de Herder pri tradukado, kiam ni plue volas redoni la tekstojn kiel eble plej laŭvorte, kiam ni fine ligas nin plej forte per kunpreso de la muziknotoj, ebligante tiel al ĉiu leganto aŭ kantanto kontrolon pri la akordiĝo de l' tekstoj al la melodioj: kiel ni sukcesos? Eble nin subtenos la nova rimedo de la internacia lingvo, kiun Herder ankoraŭ ne povis uzi. La praktiko montros, ĉu ĝi estas pli taŭga „ŝipo, kondukanta el la insuloj de l' feliĉuloj“ al ni, ol ĉiu ajn popola lingvo.

Sed kiel ajn estu: Kiu ekvolas traduki popolkantojn, tiu profunde konsciis pri la malfacileco de sia tasko. Li estu kontenta, se inter dek bonaj tradukoj unu fariĝis perfekta; ĉar tian sukceson oni ne povas eldevigi per la fortoj de l' cerbo — ĝi restas dia dono de benita momento.

## SPECIMENAJ PAĜOJ

**MABEL WAGNALLS, PALACO DE DANGERO** (Rakonto pri Madame la Pompadour). El la angla originalo tradukis *Edward S. Payson*. 1926. 206 paĝoj. Luksa tolbindaĵo: Rm. 6.—



### ĈAPITRO IX.

Tiun saman posttagmezon nekonatulo vizitis la markizinin. Li ne diris sian nomon al la lakeo ĉe la pordo, sed anstataŭe li sendis al ŝi ringon.

Tuj oni lin enlasis, kvankam la markizino ĵus antaŭe diris al Gourbellon, ke ŝi akceptos neniun post la foriro de la vizitantoj.

La novevenanto portis longan mantelon, grizan barbon kaj okulvitrojn. Kiam li pasis tra la antaŭĉambro, la sinjoroj atendantaj rimarkis lian imponan sintenadon kaj lian elastan paŝon. Ili konsultis inter si pri lia identeco, ke li tiel facile gajnis la rajton de aliro; ili konjektis lin fremdulo, sekreta

sendito de Aŭstrujo, ĉar oni diris, ke de tempo al tempo komunikaĵoj pasis inter la Pompadour kaj Marie Thérèse.

Ili demandis la servanton de la fremdulo, sed sen rezulto. Unu ekrigardo en la buduaron, se tio estus estinta ebla, estus pruvinta, ke iliaj konjektoj estis tute malpravaj.

Ĉi tie, kun fermitaj pordoj post li, la vizitanto impulseme deĵetis la



mantelon kaj aliveston, kuregis antaŭen kaj surgenuiĝis antaŭ la markizino, kisis kaj rekisis ŝiajn manojn, dum li rave ekkriis:

„Fine! fine mi estas kun vi! Markizino! — diru al mi, ke vi ĝojas — nur iomete ĝojas vidante min!“

Estis pli multe da malpacienco ol ardo en la respondo, kiun li ricevis:

„Kompreneble mi estas ĝoja — ĝoja, ke vi ankoraŭ vivas! Ĉu vi komprenas, ke estas nur miraklo, ke oni ne rekonis vin kaj enkarcerigis vin en la *Bastille*! Kio povis logi vin al tia freneza ago?“

„Vi — vi estis la allogilo; vi, ĉiam vi,“ li murmuris, ankoraŭ ame karesante ŝiajn manojn.

„Sed vi endanĝerigis min kiel ankaŭ vin. Estis via devo konsideri min, kiam vi eniris tian danĝeran entreprenon.“

„Mi konsideris nenion alian; mi ne povis forlasi vin, ĉu vi ne komprenas?“ li petegis.

„Jes, jes, kompreneble, sed la risko estis tro granda. Kaj vi ankaŭ endanĝerigas nin ambaŭ. Kiel vi kuraĝis veni ĉi tien? Tio estas frenezeco.“

„Markizino, ne riproĉu min; mi nepre devis vidi vin — mi ne povis vivi, ne vidante vin.“

„Sed letero de ekzilo ne estas malgravaĵo. Estis via devo, obei la ordonon de la reĝo. Tamen donu al mi pluajn sciigojn pri la afero,“ ŝi daŭrigis malpli severe. „Kiel vi trovis tiun mirindan anstataŭulon, kies aspekto trompis ĉiun — sed ne min?“

„En miaj ĉevalejoj en Vrieonne“, Romain respondis trankvile kaj kun milda tono en la voĉo, dum li pensis pri Pierre kaj la terura prezo, pagita por ĉi tiu vizito al la markizino. Li rimarkis, kiel malsimila ĉio estas al tio, kion li atendis. Li ne povis kompreni klare la staton, en kiu li sin trovis, sed malprecize li komprenis, ke ŝiaj vortoj ne estis la vortoj, kiujn li esperis; li neniam imagis, ke ŝi riproĉos lin. Li sentis sin kvazaŭ en konfuza inkubo, tra kiu penetris la tonoj de ŝia voĉo, strange malvarmaj.

„En Vrieonne! Kiel mirinde! — ke stalknabo tiel perfekte similis sian mastron!“

Estis mallonga paŭzo, tiam ŝi aldonis: „Vi enterigis lin, mi supozas, ĉe Montmartre! Mi aŭdis la funebran sekvantaron.“

„Jes“, Romain respondis malgaje.

„Kaj ĉu tio estas efektive fakto“, la markizino persistis malkredeme, „ke li kuŝas nun flanke de via patro?“

Al ĉi tiu demando Romain respondis kun impulsa malkaŝemeco: „Mi ne nur diras, ke tio estas vera, sed, ke ĝi estas eble justa ironio de la sorto, ĉar mi opinias — jes — mi kredas — ke li havas la rajton.“

„Sed se oni rekonos vin — la servistoj. Dio mia! Mi ne kuraĝas, eĉ pensi, kio povus rezulti je la plej malgranda suspekto! Sed“ — ŝi aldonis pli milde, dum ŝi rimarkis la esprimon de disreviĝo sur lia vizaĝo — „mi ne intencas riproĉi vin!“

Li staris antaŭ ŝi kun dignoplena sintenado, dum ŝi rigardis al lia bela personeco kaj pensis pri la troriskema kuraĝo, kiu igis lin, ŝin viziti.

**D-ro EDMOND PRIVAT, HISTORIO DE LA LINGVO ESPERANTO.**  
**II-a parto: LA MOVADO, 1900—1927. 1927. 199 paĝoj. Luksa tolbindaĵo: Rm. 6.—.**

### LA FONDO DE UEA (1908)

La plej grava rezultato pozitiva de la „Delegacia“ krizo estis sendube la fondo de la Universala Esperanto-Asocio en printempo 1908. Dum la Ĝeneva kongreso sinjoro Carles proponis la kreon de l' esperantistaj konsuloj en ĉiuj urboj. Poste alia franca esperantisto, sinjoro Rousseau, licea profesoro en Bourg, proponis la fondon de Esperanto-oficejoj, t. e. elekto de iu butikoj aŭ magazeno, kie la esperantistoj povus ricevi korespondadon, meti afiŝojn, montri adresojn de la konsulo kaj eĉ de tradukistoj por komercaj leteroj en Esperanto.

En Genève Paul Berthelot fondis en 1906 propagandan gazeton „Esperanto-journal“. Ĝin reprenis Hector Hodler post la kongreso por krei sian organon „Esperanto“ en Januaro 1907. La celo estis kuraĝigi kaj faciligi tiun praktikan flankon de la Esperanto-movado. En ĉiu numero duonmonata aperis en bona ordo adreslistoj de la novaj konsuloj kaj Esperanto-oficejoj kun tre interesaj ĉefartikoloj pri la utileco de la helplingvo por scienco, tekniko, turismo, komerco ktp. Baldaŭ la gazeto fariĝis la organo de la nove kreitaj fakaj societoj. Kun granda talento kaj insista metodo Hector Hodler redaktis la ĵurnalon kaj samtempe gvidis tiun novan direkton de la movado. Filo de la fama pentristo Ferdinand Hodler, li estis ankoraŭ 19-jara kaj ĵus finis la gimnazion antaŭ la kongreso de Cambridge; silentema, tre sendependa kaj aŭtoritate persistema, li sin donis tute al tiu elektita laboro kaj preferis vivi malriĉe ol ĝin forlasi.

Kiam eksplodis la krizo en Novembro 1907 Hodler opiniis, ke neniu rajtas el ekstere trudi teoriaĵojn al uzantoj de la lingvo, sed, ke oni povus ekzameni kelkajn el la konsiloj de la Delegacia Komitato kaj riĉigi la teknan lingvon per novaj sufiksoj kaj utilaj reguloj ilin provante per uzo kaj nenion tuŝante la akceptitan fundamenton de la komuna lingvo. Lin impresis la konflikto pri kompetenteco inter Delegacio, Lingva Komitato, d-ro Zamenhof, kongreso ktp., kaj la ĝenerala dubo pri tio: kiu laŭleĝe reprezentas la uzantojn de Esperanto, ĉu la Lingva Komitato, elektita per aklamado en Boulogne, ĉu la kongresoj, ĉeestataj nur de tiuj, kiuj povas vojaĝi tien.

